WIKIPEDIA

Majoa lingvo

La **majoa lingvo**, hispane *Mayo*, apartenas al la jut-azteka lingvaro. Ĝi estas la tradicia lingvo de la majooj, kiuj vivas en la sudo de la subŝtato Sonora kaj en la nordo de la najbara subŝtato Sinaloa de Meksiko. Tamen laŭ la retejo ethnologue (vidu la referencon) nun nur 33 000 el la sume proksimume 100 000 etnanoj plu parolas la majoan lingvon. Sub la "Leĝo de Lingvaj Rajtoj," la majoa estas agnoskita kiel "nacia lingvo" kune kun 62 aliaj indiĝenaj lingvoj kaj la hispana, kiuj ĉiuj havas la saman validecon en Meksiko.

Majoa	
Parolata en	centra Meksiko (subŝtatoj Sonora kaj Sinaloa)
Denaskaj parolantoj	32 900 (2000)[1]
Fremdlingvo / dua lingvo por	ne konatas
Lingva statuso	5 krize endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	Neniu
ISO 639-3	mfy
Glottolog	mayo1264
Angla nomo	Mayo
Franca nomo	mayo

Morfologio

Mayo estas aglutina lingvo, en kiu vortoj uzas sistemon de sufiksoj por diversaj celoj kun pluraj morfemoj "kungluataj".

Referencoj

1. ↑ laŭ la retejo *ethnologue.com*, 17-a eldono, 2013 (http://www.ethnologue.com/language/mfy), laŭ informoj de la nacia prilingva statistika instituto INALI

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Majoa_lingvo&oldid=5438091"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:49, 29 mar. 2014.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.